

# Dua Informilo

## gravaj informoj

### Karaj aliĝintoj al la Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg,

ni ĝojas ke post la dujara paŭzo kaŭzita de la pandemio denove povas okazi ĉeesta kongreso en la kutima grandeco. Ni atendas proksimume 150 partoprenantojn. Ni tre ĝojas pri via partopreno.

Jen kelkaj lastaj informoj:

### Kongresa adreso

Centra renkontejo kaj kongresa adreso estas la junulargastejo:

**Jugendherberge, Straßburger Straße 6, 26123 Oldenburg, telefono: +49 441 87135.**

**Vendrede ekde 15:00** nia akceptejo estos malfermita en la **vestiblo**. Alie, la organizantoj estos atingeblaj dum la kongreso en la konferenca oficejo en la ĉambro **Hafenlounge en la unua etaĝo**

### Organiza teamo

La organiza teamo estas atingebla per mobiltelefonoj:

- +49 176 4471 4714** Brigitte Kranz (aliĝoj, loĝigo, ekskursoj)
- +49 176 4576 3799** Anne Höpken (loĝigo)
- +49 176 5629 5129** Stefan Krieghoff (financoj, ekskursoj, surlokaj aferoj)
- +49 170 7721 210** Elisabeth Kuhl-Kruse (kultura programo)
- +49 171 6832 317** Franz Kruse (kunordigo, programo, interreto)

### Trajnveturantoj

Forlasu la stacidomon en nordan direkton (centra busstacio ZOB). De tie orienten al la Straßburger Straße, de tie maldekstren – la junulargastejo estas post 120 m maldekstre.

► [Piedira vojo de la norda flanko de la stacidomo \(160 m\)](#)

### Parkejoj

La junulargastejo bedaŭrinde ne havas propran parkejon. En piedira proksimeco vi havas du eblojn por parki (vi trovas ilin en tiu ĉi mapo: <https://www.google.com/maps/d/viewer?mid=15dn8U0TFZd1j9stul-Oc0tsdFG9n9wub&ll=53.145509547137415%2C8.2266043394698&z=18>):

1. la park-domo ĉe la ĉefstacidomo Oldenburg (<https://www.oldenburg.de/startseite/leben-umwelt/verkehr/parken/park-rail.html>). Ĝi normale kostas 5 € tage, do 20 € por 4 tagoj (vendredo ĝis lundo). Sed eblas aĉeti parkbileton por la 4 tagoj per antaŭmendo ĉe la organiza teamo. Tiu kostas 12 €, bonvolu atenti nian apartan mendilon, kiun ni sendis al vi retroŝte.
2. apud la proksima *EWE-Arena* por 3 € tage.

### Nomŝildoj

Partoprenantoj ricevas nomŝildon kun sia nomo kaj aliaj informoj. **Bonvolu ĉiam porti la nomŝildon!** Ĝi estas via pruvilo pri aliĝo kaj manĝoj.

## Loĝado en la junulargastejo

Por partoprenantoj loĝantaj en la junulargastejo la ĉambroj estas disponeblaj ekde 15:00 vendrede (2022-06-03) ĝis 10:00 lunde (2022-06-06). Vi ne bezonas kunporti litotukojn, kaj la junulargastejo disponigas unu garnituron da mantukoj. Por eniri vian ĉambron vi ricevos ŝlosilkarton, kiun vi nepre devas redoni antaŭ via forveturo lunde – alikaze ĝi kostos 20 €.

## Restadejo/renkontejo

La **vestiblo kaj la teraso** de la junulargastejo servas ne nur kiel manĝejo, sed ankaŭ kiel loko por ripozi kaj restadi inter kaj post la diversaj programeroj. La vestiblo estas daŭre malfermita ankaŭ nokte kaj ofertas riĉan kolekton de trinkaĵoj. Ĝi nomiĝas *Schirrmanns* kaj estas malfermita ankaŭ por la publiko (<https://schirrmanns.jugendherberge.de>).

## Salonoj

La programeroj okazas en du ejoj en piedira distanco:

- **junulargastejo**: Ĉi tie okazas ĉefe prelegoj, laborgrupoj, kunsidoj kaj ankaŭ la libroservo, la lingvokurso kaj la kongresa oficejo. Ĉiuj salonoj troviĝas en la unua etaĝo en la sama koridoro.
- **City Club Hotel (CCH)**: Ĉi tie okazas ĉefe la malferma kunveno, la vespera kultura programo, la GEA-membrokunveno kaj laŭbezone iuj aliaj programeroj. La hotelo estas facile piede atingebla de la junulargastejo. Skizon pri la vojo vi trovas en la kongreslibro.

## Programo

Ĉar la kongreso ĉi-jare estas agnoskita kiel oficiala kleriga aranĝo de Erasmus+, ni havas aparte riĉan programon kun paralelaj programeroj pri diversaj aspektoj de la ĝenerala temo "Daŭripovo". Ĉiujn detalojn pri la programo kaj la kongreso ĝenerale vi trovas en nia retpaĝaro ([www.esperanto.de/eo/gek2022](http://www.esperanto.de/eo/gek2022)) kaj en la kongreslibro, kiun vi ricevas post via alveno surloke.

## Ekskurso al la marĉo (Goldenstedt)

Se vi partoprenos la ekskurson al la marĉo en Goldenstedt, ne forgesu kunporti **fortikajn ŝuojn**.

## Ekskurso al Bremen

Partoprenantoj en la lunda ekskurso al Bremen ne ĉeestas por la tagmanĝo, sed povas prepari lunĉpakaĵon dum matenmanĝo. Ili ne revenos al Oldenburg, sed povas rekte de Bremen veturi hejmen. La ekskurso finiĝos je 13:30. Trajnveturantoj povas enŝlosi siajn pakaĵojn en valizulojn en la stacidomo, aŭtoveturantoj povas parki proksime de la stacidomo.

## Lingvokurso por komencantoj

Dum la kongreso okazas ankaŭ lingvokurso por komencantoj, detalojn vi trovas en nia retpaĝaro. Ĝi estas senpaga kaj malfermita al la publiko, same la vesperaj koncertoj. Se vi konas kandidatojn por la kurso, instigu ilin partopreni.

## Pandemia situacio

Fine de marto en Germanio forfalis preskaŭ ĉiuj limigoj pro la pandemio (nur en malsanulejoj, flegejoj kaj publikaj trafikiloj necesas ankoraŭ porti maskon). Laŭ aktuala stato do ne plu necesas atenti iujn pandemiajn regulojn en la kongresejo.

Dum la kongreso ni senpage disponigas **maskojn** kaj ofertas **testojn** en dubaj aŭ suspektaj kazoj.

## Junulargastejo = inkluda laborejo

La Oldenburga junulargastejo estas modela establaĵo por inkludo en la labora vivo. Preskaŭ duono de la 40 dungitoj de la junulargastejo havas handikapon. Ĉi tiuj inkluzivas psikologiajn kaj intelektajn limigojn kiel depresion kaj aŭtisman aŭ fizikajn handikapojn kiel surdecon, epilepsion aŭ MS. "Neniu estas por ni senutila," diras la domestro Markus Acquistapace, "nek ni konsideras, ĉu la malsano progresas." En ĉi tiu kazo, la laborejo simple estus adaptita. Krome, la dungitoj kun handikapo ne tuj laboras plentempe – ili komencas kun 20 ĝis 30 horoj laŭdezire kaj havas la eblon pliigi.

## Nia kongresurbo Oldenburg



Tiu ĉi mapo montras krom niaj du kongresejoj ankaŭ aron da vidindaĵoj en nia kongresurbo Oldenburg: <https://www.google.com/maps/d/viewer?mid=15dn8U0TFZd1j9stul-Oc0tsdFG9n9wub&usp=sharing>

En viaj kongresaj dokumentoj vi trovas i. a. mapon (germana/nederlanda kun Esperanto-traduko) kaj malgrandan gvidlibron (germana/angla).



Paralele al la kongreso okazas la junulara renkontiĝo *Kreema Esperanto-Kurso* (KEKSO) en apartaj ejoj ([https://esperantojugend.de/retpagxo/de/unsere\\_treffen/kekso](https://esperantojugend.de/retpagxo/de/unsere_treffen/kekso)). Ĝiaj partoprenantoj havas liberan aliron ankaŭ al la kongreso.

Atentu nian retpaĝaron kun ĉiuj kongresaj detaloj:

[www.esperanto.de/eo/gek2022](http://www.esperanto.de/eo/gek2022)